

Vorto de la Prezidanto

Finiĝis la lernoĵaro, riĉa je renkontiĝoj, pliaj scioj kaj entuziasmo. Somero estas por esperantistoj sezono plena je eblecoj plustudi en la diversaj staĝejoj (Grezijono, Kvinpetalo, Pluzec, Sète), partopreni internaciajn aranĝojn (Azia Kongreso en Mongolio, Universala Kongreso en Kubo, Itala kongreso apud Venecio) aŭ akcepti eksterlandanojn, kiuj tre volonte vizitas

nian belan regionon. Ne forgesu daŭrigi la enketon: vi trafos diversajn homojn el diversaj medioj, kaj kaptos okazon informi pri esperanto, disdonante la slipeton Esperanto.net.

Bonan ripozon kaj aktivan someron al ĉiuj.

Pierre Oliva

Finiĝis la lernoĵaro:


Ekzamensesio en Marseille: gratulojn al la kandidatoj. Kvin trapasis kaj sukcesis la unuagradan ekzamenon de FEi, tri trapasis kaj sukcesis la duagradan. Dankojn al Jacques, kiu gastigis per kafo en Collège Pasteur, dankojn al la ĵurianoj (Patrick, Rose-Marie kaj Renée), kiuj senpage vojaĝis al Marseille kaj laboris la tutan tagon.

Spektakleto en La Ciotat: la 12an de junio, lernantoj de la unuagrada kurso memstare enscenigis teatraĵeton por prezenti la agadon de Esperanto-la Ciotat okaze de la festo de la kvartalo Fontsaïnte

Ekskurso al Arles la 19an de junio: dankojn al Sylvaine pro ŝia raporto (mallongigita) kaj al Dominique kaj Danielle Pflieger el Puyricard (13) por la organizo.

Dudeko da homoj el Aix, Avignon kaj Bretonio vizitis la muzeeton pri loka trajneto, kiun uzis Van Gogh, Daudet, Mistral kaj eĉ Jeanne

Calment, iama plej maljuna Francino, kiu pozas en Arleza kostumo en esperanto-bulteno de 1905! La vojaĝo je 20km/hore permesas ĝui la pejzaĝon. Sekvis vizito al la Muelejo de Daudet, nun privata olivolea muelejo kun moderna maŝinaro por la kuraĝuloj, kiuj pretis grimpi dum aliaj vagadis tra la stratetoj de la vilaĝo Fontvieille. Pikniko en Arles sub la platanoj permesis, ke «finfine ni aŭdis esperanton». Sekvis rapida vizito al la malnova centro de Arles kaj vizito de la muzeo pri Antikvaĵoj, kie eblas admiri la buston de Cezaro, elkotigita el la Rodano. Venis la momento disigi... aŭ daŭrigi per vizito de Grand Barbegal kun ok akvomuelejoj konstruitaj de la Romianoj.



Pikniko en Agay la 26an de junio: (laŭ raporto de Monique Prezioso) Agrablas pikniki en pinarbaro borde de la naĝejo, dum Roland Delagneau aŭ Jean-Claude Roget rakontas historion kaj Christine Grayssaguel laborigas la cerbojn per kvizo! Sekvis loterio.

Fête des Solidarités en Sainte-Tulle (04) la 26an de junio: niaj agemaj samideanoj, kiuj organizis la regionan kongreson en Manosque ne ripozis: ili partoprenis feston de Solidareco, havis budon, kie dum la tuta tago José Grammatico, Jean-François Bettus, André Pettyn kaj



Bernard Greck informis la vizitantojn. Plej ofta demando estis: «Kial esperanto ne estas pli disvastigita?» al kiu venis respondo: «Kion vi mem faras por diskonigi ĝin?» Dum la festo, eblis aŭdi esperanto-kanzonojn el DVD provizita de Bernard.

Akcepto de eksterlandanoj: Dum kuraĝuloj trapasis ekzamenon, Thierry Spanjaart orga-

nizis la restadon de Rusino, kiu nepre volis viziti la If-kastelon, kaj vizitis lunde la esperanto-kurson en maison des associations.

Okaze de vizito de novaj kaj junaj esperantistoj el Hungario, familio Prezioso akceptis 24 esperantistojn hejme por komuna vespermanĝo. Feliĉe, ĉiuj kontribuis!

Raporto pri nia Regiona Kongreso en Manosque la 8an kaj 9an de majo.

Manosque, urba centro norde de Aix proponis agrablajn kongreskondiĉojn: la Domo de Asocioj estis je nia dispono por kursoj, prelegoj, koncerto sed ankaŭ libroservo kaj piknikoj. «La ideo porti unu pladon kaj poste dividi kun la aliaj estas bonega okazo konatiĝi kun aliaj» konstatis Luki. «Evidente estas tro multe, kaj ni manĝas tro multe, sed estas vera plezuro!».

Sabato estis dediĉita al kulturaj aranĝoj: prelegoj kaj kursoj, kun koncerto vespere, dum dimanĉe okazis la Membrokunveno de la federacio.



Christine gvidas la konversacian rondon

Konversacia rondo; ĝin gvidis kun granda talento Christine Grayssaguel. «Ĉiuj kuraĝis paroli» «ŝi havas talenton paroligi la homojn» «bildoj aŭ ludoj multe helpas», jen kelkaj rimarkoj de la partoprenantoj.

«Kial Kopenhago devis fiaski», titoliĝis la prelego de Patrick Lagrange. Kopenhago, ĉefurbo de Danlando, kiu akceptos venontjare la Universalan Kongreson de Esperanto, akceptis en decembro 2009 tutmondan konferencon pri klimatsanĝoj. La tuta mondo atendis la rezoluciojn de la gravuloj (sciencistoj aŭ politikistoj)

por eviti, ke nia planedo «elsplodu». Tro da loĝantoj, tro da uzita energio, tro da gasoj en la atmosfero, urĝas reagi se ni deziras, ke niaj pranejoj pluvivu. Kelkaj sciencistoj konsideras, ke altigo de temperaturo dum dekoj da jaroj nenion signifas en komparo kun la milionoj da jaroj de nia planedo, dum aliaj konsideras, ke pro la homa vivo dum unu jarcento komplete modifiĝis la kondiĉoj. Helpe de ekranoj kaj multaj grafikoj, Patrick Lagrange provis klarigi, kial tiu Konferenco devis fiaski, ĉar la politikistoj ne pretas modifi nian vivmanieron, nian kutimon produkti por konsumi pli kaj pli. Vivo kiel Usonano (la deziro de la plimulto) eblas por 3 miliardoj da homoj, ni jam estas 7.... kaj kio poste?

«Eterna Rusio»: kadre de la Jaro de Rusio en Francio, Renée Triolle proponis tri debatojn pri la eternaj trajtoj de Rusio. Sendepende de la periodoj aŭ de la reĝimoj, regas centrismo, imperiismo, kolektivismo (fronte al individuo). Eĉ se rusa teritorio estis enloĝata ekde la bronza periodo, historio de Rusio komenciĝas pli malfrue ol la franca: la unua poeto, Puŝkin, estas samtempulo de Victor Hugo, same pri pentristoj, aŭ politikistoj (Petro la Granda eniras Versailles kun la eta Ludoviko la XVa en la brakoj). La lasta kontribuo concernis la rusan lingvon, inter alie, la rilatojn inter rusa lingvo kaj esperanto.

Koncerto de Franz Mimmerŝeim: sabato vespere: la salono transformiĝis al koncertejo kaj Franz al profesia kantisto (kio li estas, kiel animanto de diversaj vesperoj). Vere apertas lia profesieco: en la vestaĵo, la maniero paroli al la mikrofono, zorgi la muzikan akompanion. Li vere malkovris sian multflankan talen-

ton, kantante en diversaj lingvoj (franca, hispanan, angla) kaj ankaŭ en esperanto. Li surprizis nin per sia kapablo imiti kantistojn, kiel vera mimo: plej amuza certe estis Bourvil-aĵo: «la taktiko de la ĝendarmo», kie voĉo, gestoj kaj sinteno kontribuis al imitado! Brave al li.



Prelego fare de Patrick Lagrange

Vizito de Manosque: dimanĉe posttagmeze, Patrick Lagrange, profesia regiona ĉiĉerono (guide de pays) promenis dudekon da homoj tra la stratoj de la urbo, instalita sur la pinto. Patrick bele klarigis, kiel la vivo de la urbo koncentriĝas je la aliro al akvo (multas fontanoj) kaj protekto kontraŭ la vento. En tiu urbo naskiĝis kaj vivis Jean Giono: ni povis vidi la domon, kie li naskiĝis eĉ se memortabulo troviĝas aliloke, kaj diveni, malantaŭ alta muro, la domon, kie li skribis, ekz «la homo, kiu plantis arbojn», tradukita al esperanto. Dank'al la klopodoj de José Grammatico kaj aliaj, strato Zamenhof ekzistas, kie ni fotiĝis.

Libroservo: ĝin zorgis Monique Prezioso, kiu es-



Franz Mimmerseim kantas

tis portinta la stokon de la grupo de Cannes. De pluraj jaroj, la politiko de la Federacio estas vendi brokante librojn de forpasintaj esperantistoj aŭ donacintoj. Tio ebligas trovi malnovajn aŭ elĉerpitajn librojn, sed ĉefe provizi niajn membrojn per malmultekostaj legaĵoj (1 aŭ 2 eŭroj !); sekve alkitimigi ilin al legado de esperantolibroj, la plej bona sistemo por akiri lingvajn refleksojn kaj grandigi sian vortprovizon. Novaj libroj, vortaroj, bildstrioj ktp estis ankaŭ aĉeteblaj

La redakcio dankas Astrid Millet, Patrick Lagrange kaj aliaj, pro iliaj raportoj aŭ rimarkoj.

Nova estraro de Esperanto-Provence

Prezidanto: Pierre OLIVA

Vic-prezidanto: Monique PREZIOSO

Sekretario: Monique ARNAUD

Help-sekretario: Claudie DEMONGEOT

Kasisto: Michel CERISAY

Bulteno: Pierre OLIVA, Renée TRIOLLE

Reprezentanto ĉe Esperanto-France: Monique ARNAUD kaj Gilles WALLEZ

Komitato:

Bonvenon al novaj komitatanoj: Isabelle Gonzalez el Gardanne(13), Thierry Spanjaard el Marseille(13) kaj Nicole Wallez el Draguignan (84)

Resumo de la Membro-Kunveno (el la protokolo verkita de Monique Arnaud)

Ĝi okazis dimanĉe la 9an de majo 2010. Eblas konstati plibonigon de la rilatoj kun kelkaj grupoj, eĉ se ni daŭre bedaŭras mankon de kunlaboro aŭ kunagado ;

Financoj: dank'al la organizo de du landaj kongresoj (La Roque d'Anthéron kaj Martigues) estas mono, eĉ se ni ne ricevas subvencion. Daŭre mankas novaj membroj, kaj ne eblas konsideri, ke la kotizo (5 eŭro) estas bremsilo al membriĝo. Nur kelkaj kluboj aŭtomate petas membriĝon al la federacio.

Prezento de lokaj kluboj: interŝanĝo de spertoj povas doni ideojn ĉefe se temas pri enplektigo de esperanto en diversajn urbajn kulturajn aranĝojn.

Informado interna: ni disponas pri bulteno (kvar numerojn jare, kiun momente redaktas Renée Triolle kaj enpaĝigas Bernadette Deschanel) kaj blogo, kiun zorgas Franz Mimmersheim. Ne forgesu anonci aŭ raporti!

Informado ekstera: nenio farita flanke de la federacio mem, sed jes, kelkaj grupoj efike

informas.

Instruado, ekzamenoj: en aktivaj kluboj funkcias kursoj (malofte 3a grada), nur kelkaj instruantoj kuraĝigas siajn lernantojn trapasi la ekzamenojn de FEI aŭ de la Eŭropa referenckadro.

Prochains rendez-vous:

21-28 août à Lignano Sabbiadoro (près de Venise) Italie: 77^{ème} congrès d'espéranto et possibilité de passer les examens internationaux d'espéranto du Cadre Européen de Référence <http://www.esperantoitalia.it>

Noël en Allemagne: 27^{ème} Internacia Festivalo à Nördlingen, petite ville du Moyen-Age en Bavière; rencontre internationale de taille moyenne, où il est facile de communiquer avec des étrangers, tout en participant à une rencontre enrichissante

www.internacia-festivalo.de

Septembre dans notre région:

6 septembre conférence à la Ciotat de Mireille Grosjean, représentant *Universala Esperanto-Asocio* à l'ONU à Genève:

«Une nomade atypique : l'anglais pour acheter son billet d'avion, l'espéranto pour se faire des amis»

Enseignante en langues, spécialiste en éducation interculturelle, Mireille Grosjean est à la retraite depuis l'été 2008.

Dans le mouvement de l'espéranto:

- déléguée d'UEA auprès de l'ONU à Genève
- co-présidente de la Société Suisse d'Espéranto (SES) et porte-parole pour la Suisse romande
- représentante de la Suisse au comité de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA)
- présidente de la section suisse de la Ligue mondiale des Enseignants d'Espéranto (ILEI)
- présidente de la Commission Internationale d'examens (niveau mondial)
- conseillère de la Commission pour l'Afrique d'UEA.



Mireille Grosjean

11 septembre : **la Ciotat** - forum des associations

12 septembre : **Marseille** - forum des associations

18 septembre : **La Ciotat** - fête des Places.

N'oubliez pas de faire connaître vos activités et rencontres :

- pour le bulletin : triolle.renee@wanadoo
- pour le blog : franz@mimmersheim.fr
- pour la France : esperanto-jeunes.org/local (entrer le code postal).

Langue. Les espérantistes de La Ciotat ont participé à un congrès en Allemagne.

Dialogue d'outre-Rhin

■ Pour la deuxième fois en quarante ans, espérantistes français et allemands se sont réunis pour un congrès à Kaiserslautern, dans le Palatinat.

La Ciotat était représentée par Renée Triolle et la Provence par des espérantistes de Gap, Draguignan et Aix-en-Provence. Outre, les réunions statutaires « obligatoires, mais ce n'est pas le plus important » comme l'indique Renée Triolle, « ce qui compte, c'est la richesse de ces rencontres et l'interculturalité au quotidien ».

Alors que la France découvrait un nouveau talent, Guillaume Amide, qui a dévoilé lors d'un concert toute sa fougue, son émotion et sa virtuosité, la chorale Interkant interprétait « Chant général » de Pablo Neruda, mis en musique par Théodorakis et traduit par Georges Lagrange. « Je ne pense pas qu'il en existe une version en français, mais quel hymne à la terre et à l'homme ! » confesse Renée Triolle. « Quel plaisir de voir se mélanger toutes les générations quand le groupe folk Kapriol des Pays-Bas fait danser



René Triolle (à droite) a participé à cette rencontre d'espérantistes en Allemagne.

ou chanter tout le monde ! »

Le centre du congrès a proposé une exposition de mauvaises herbes, toutes ramassées dans la ville, un service de librairie agrémenté notam-

ment par la maison d'édition tchèque Kava-Pech, des conférences de mathématique et la présentation d'associations.

DR

La Marseillaise (Aubagne - La Ciotat - mai 2010)

Entretien avec Daniel Moirand,

à l'occasion de la parution en espéranto de «Le Comte de Monte-Cristo»

Entretien avec Daniel Moirand, à l'occasion de la parution en espéranto de «Le Comte de Monte-Cristo»

Daniel Moirand habite Aix-en-Provence. Professeur de russe à la retraite, il s'est déjà fait connaître par un ouvrage sur l'emploi de l'accusatif en espéranto (1990), un roman policier «Krimo en Esperantujo» (1998) et la traduction de «Le livre des Merveilles de Marco Polo» (UEA, 2001). Aujourd'hui paraît chez FEL (Flandra Esperanto-Ligo) la traduction en espéranto du livre d'Alexandre Dumas, deux

volumes de 1184 pages ou version ePub, Mobi ou PDF.

E-P: Vous nous avez donné un avant-goût de cette œuvre lors d'une conférence sur Alexandre Dumas, à l'occasion du congrès d'Espéranto-France à Martigues. Pourquoi cet auteur vous attire-t-il?

D.M: Les Dumas, c'est une famille qu'on appellerait aujourd'hui multiculturelle. Alexandre Dumas est considéré par certains comme un écrivain de deuxième ordre, alors que c'est un bas-

.../...

tion de notre littérature. Sa langue est d'une grande richesse et d'une grande qualité littéraire. Il a l'art de mélanger l'histoire authentique et le romanesque.

E-P: En effet, tous les Provençaux qui ont visité le Château d'If savent qu'Edmond Dantès est le fruit de l'imagination d'Alexandre Dumas, alors que l'Abbé Faria (ou Mirabeau) y ont été vraiment incarcérés.

D.M: C'est tout l'art de l'écrivain et le talent de l'artiste que de mêler faits historiques et romanesques sans avoir la prétention de faire œuvre d'historien.

E-P: Quelles ont été les principales difficultés que vous avez rencontrées pour la traduction?

D.M: Même si j'ai retrouvé mes émotions d'enfant, j'ai dû me plonger dans la réalité française du XIX^{ème} siècle, retrouver le sens ancien de mots qui ont évolué, sans parler des situations, traits de caractère ou réactions des personnages qui ont vécu il y a un siècle et demi.

E-P: Vous êtes un «maniaque» de la précision. Je me souviens de vos recherches pour situer exactement «La Réserve» à laquelle il est fait

allusion dans le livre.

D.M: En effet, j'ai ajouté en fin de chapitre les explications, nécessaires aux étrangers qui liront «Le Comte de Monte-Cristo» (c'est le but de la traduction en espéranto, faire connaître l'œuvre le plus largement possible, même si Dumas a été traduit dans de nombreuses langues), mais aussi aux Français d'aujourd'hui.

E-P: Les illustrations, un tantinet vieillottes, nous plongent dans l'univers des feuilletons du XIX^{ème} siècle.


D.M: C'est vrai, elles sont d'époque et participent à cette mise en condition, même si les deux tomes peuvent être achetés en version numérique!

E-P: Je rentre de Mongolie où j'ai terminé ma présentation de la littérature française en espéranto par votre traduction. Et j'ai entendu fuser dans la salle «si c'est Daniel Moirand qui l'a traduit, c'est certainement très bon»: sans commentaire. Avez-vous d'autres projets?

D.M: Je viens de terminer un autre pavé «Les mille et une nuits».

E-P: Je vous remercie.

«La grafo de Monte-kristo», FEL 2010 - tradicia bindita versio (en 2 volumoj)
formato 135 x 210 mm; pezo 133 gr, 1184 paĝoj, ISBN 978-90-77066-43-0
prezo che FEL: 96 eŭroj (inkluzive de registrita afranko)
kiel e-libro (ePUB, Mobi aŭ PDF) 32 eŭroj



Daniel Moirand prezentas la du volumojn de «La Grafo de Monte-Kristo»